

LA PROGRESO

Bohema organo esperantista ☐ Ĉasopis českých esperantistů

Aperas monate. Jara abono K 4.50 (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

PUBLIKA LETERO.

Nia ŝtata konglomerato de pli ol dek nacioj similas nesteton de diverspecaj birdidoj, kiuj senĉese interbatiĝas, neniam povante akordiĝi.

Germano ne akordiĝas kun Bohemo, Magiario kun Slovako, Sloveno kun Kroato, Tirolano kun Italo — kaj ĉio ĉefe nur pro diverseco de gepatra lingvo. Mankas tie ĉi ligilo, kiu kunligus ĉi tiujn naciojn, aŭ almenaŭ ilin proksimigus. Kaj el tio devenas la malĝojigaj rilatoj inter la registaro kaj unuopaj nacioj.

Malĝoje estas rigardi la senĉesajn naciecajn konfliktojn, la maljustecon kaj mal-saman ulnon, per kiu oni mezuras al tiuj aŭ aliaj. Kiel dolore tuŝas noblan animon la lingva malamikeco de unuj kontraŭ la aliaj. Kiaj tuberoj de malbono jen kreskas en socio de la homoj, kiuj prefere al si en sia regno reciproke helpadu kaj sin sub-tenu, kie la interna forto ekfloru en bukedon de la progreso kaj de la kulturo!

Sed ĉe ni estas sen konkordo ĉio detruata kaj nenio konstruata. Malĝoje estas rigardi en ruinojn de rasa venĝemo. Dum epokdaŭro ni alkutimis je tiu malĝoja malbono kaj ni eĉ ne scias al ni prezenti la veran malon.

Dum jaroj, eĉ epokoj, ni interbatiĝas por la lingvo, ni batas kaj defendas nin, ĉar la gepatra lingvo estas sankta heredaĵo de niaj gepatroj. Sed kiom da valora tempo oni perdas pro tiu ĉi batalado, kiom da energio perdiĝas, kaj la rezultato — — —? Inda por libera homaro, kiel por almozulo la almozo.

Ni ne volas esti almozuloj, kies almozo estu ilia gepatra lingvo, ĉar por kultura nacio estas malinde peti tion, kion la

VEŘEJNÝ LIST.

Náš státní konglomerát více než deseti národů podobá se hnízdečku sobě cizích ptáčat, které se věčně mezi sebou rvou, v ničem se nemohou srovnati.

Němec se nesnáší s Čechem, Maďar se Slovákem, Slovinec s Chorvatem, Tyrolák s Italem — a vše to hlavně jen k vůli různosti mateřštiny. Není zde pojtka, jež by národy ty k sobě vázalo, neb aspoň sblížovalo. A z toho vyplývají neutěšené poměry mezi vládou a jednotlivými národy.

Smutný je pohled na ty ustavičné národnostní třenice, na nespravedlnost a dvojitý loket, jakým se měří těm či oněm. Jak bolestně se dotýká ušlechtilé mysli ona jazyková nevraživost jedněch k druhým, jaké hlízy zla bují tu uprostřed společnosti lidí, kteří by si měli ve své říši vzájemně pomáhati a se podporovati, kde vnitřní síla by měla vykvést v kytici pokroku a osvěty!

Ale u nás se bez svornosti jen boří a nic nestaví. Smutný je pohled do těch ssutin rasové nevraživosti. Zvykli jsme si věky na to smutné zlo a skoro si ani nedovedeme představití pravého opaku. A tážeme-li se po příčině — jest to řeč.

Rveme se léta, ba věky o řeč, rveme se a bráníme se, neboť mateřská řeč je posvátný odkaz našich otců. Leč co drahého času se vyplývá tímto bojem, co energie se ztratí a výsledek — ? Hodný svobodného lidstva, jako žebráka almužna.

My nechceme být žebráky, jichž almužnou má být jejich mateřština, vždyť nedůstojno jest národa vzdělaného, aby žebral o to, co příroda dala mu údělem v ko-lébce; jako dala květinám vůni a plectvu

naturu jam en lulilo por ĝi destinis; kiel odoro al la floroj kaj kanto al la birdoj estis al ĝi donacita la gepatra lingvo. Tiun ĉi, al ni super ĉio karan donacon de la naturo neniuj havas la rajton al ni ŝteli kaj ni neniam ĝin devas ŝanĝi por lingvo fremda, eble lingvo de nia delongtempa malamiko. Tial por la interkompreniĝo de la nacioj servu nur neutrala, helpa lingvo, por kies ellerno oni bezonas ne jarojn, sed semajnojn.

Ĝis nun ni estas kompantinduloj, ni estas sklavo de naciecaj bataloj, sed ni esperas, ke baldaŭ por ni leviĝos la lingva stelo de Bethlehem, kiu savos nin el la turmentoj de la lingvaj bataloj, stelo brilanta per verda lumo de la espero en pli feliĉan estontecon, la homara fratiĝo. Sed tiu ĉi miraklo venos nur post uzo de tiu radikala rimedo, kiu estas kapabla forigi la naciecajn malpacojn. Kaj tiu ĉi ideala, varme kaj sopire atendata rimedo estas la ĝenerala enkonduko de helpa neutrala lingvo, por kiu taŭgas sole nur, la en fremdlando ĉie jam konata kaj uzata, Esperanto.

Esperanto estas lingvo eksterordinare facila, belsona, taŭga por retoriko eĉ por poezio kaj kapabla por ĉiuj artaj formoj.

Enkonduku Esperanton en lernejojn, ĉar nur ĝi alportos egalrajton al la nacioj!

zpěv, dala jemu mateřskou řeč. Tento nade vše nám milý dar přírody nikdo nemá práva nám vzít a my nikdy nesmíme jej zaměňovat za řeč cizí, snad dokonce za řeč dávného našeho nepřítele. Proto k dorozumění národů má sloužiti jen neutrální, pomocný jazyk, k jehož naučení zapotřebí jest ne roků, ale jen týdnů.

Jsmo dosud ubožáci, jsme otroci národnostních bojů, však doufáme, že vzejde nám jazyková hvězda betlémská, která nás vysvobodí z útrap jazykových bojů, hvězda zářící zeleným světlem naděje do šťastnější budoucnosti, hvězda sbratření lidstva. Ale tento zázrak se dostaví teprve po užití onoho radikálního prostředku, jenž jest v stavu odstraniti národnostní různice. A tímto ideálním, vře a toužebně očekávaným prostředkem jest všeobecné zavedení pomocné neutrální řeči, za kterou jediné se hodí v cizině všude již známé a užívané Esperanto.

Esperanto jest řeč neobyčejně snadná, libozvučná, hodí se k řečnictví i k poesii a schopna všech uměleckých forem.

Zaved'te Esperanto do škol, neboť jen toto přinese nám národnostní rovnoprávnost!

Stanovte zákon, že jest povinností každého občana během určité lhůty osvojiti si

FELIETONO.



Dro Stanislav Schulhof:

La ĉokolado.

La decido de miaj kuracistoj estis definitiva, kaj mi ne povis jam kontraŭparoli. Estis nepre necese, almenaŭ laŭ ilia opinio, ke mi tuj forlasu mian okupon, precipe ĉiun spiritan laboron kaj ke mi tuj senprokraste forveturu ien en izolatan, kvietan vilaĝon, ĉar alie, diris unu el ili, oni ne povas garantii, ke mi postvivos novan atakon.

Por mi mem ĉi tio estus efektive tute indiferente, ĉar dum miaj, min jam kelkfoje vizitintaj atakoj de senkonscio, mi konvinkigis, ke la morto tute ne estas tiel terura, kiel multaj homoj opinias, sed mi devis submetiĝi, ĉar estis necese atenti ankaŭ mian familion, kaj aliajn miajn rilatojn.

Sekve la duan tagon mi forveturis en unu ne malproksiman, sed agrablan, meze de grandaj arbaroj kuŝantan vilaĝon. La vilaĝo estis al mi bone konata ĉar antaŭ la milito ĝi estis dum kelkaj jaroj nia somera restadejo.

Tuj post la tagmanĝo, kiu pro konataj kaŭzoj estis sufiĉe modesta, mi ekiris en

proksiman arbaron. Ĉar la tago estis varma kaj bela, mi plenigis abunde ĉiujn miajn poŝojn per diversaj manĝeblaj kaj bonaj aĵoj, por pasigi tie la tutan posttagmezon.

Alveninte en agrablan, al mi jam bone konatan lokon, mi demetis miajn ĉapelon kaj jaketon kaj kuŝigis kiel eble plej komode sur mian dorson. La aero estis vere agrabla kaj freŝa. La arboj staris preskaŭ senmove, kaj sur alta profunde blua ĉielo lace moviĝadis blankaj, maldensaj kaj preskaŭ travideblaj nubetoj.

Ĉar la kuracistoj malpermesis al mi ĉiun ajn spiritan laboron, mi efektive pri nenio, kaj je nenio pensis, kio cetere en simila arbara medio ne estas tiom malfacila. En simila tago la tuta naturo pensas anstataŭ vi kaj viaj homaj pensoj ĝin nur ĝenas.

Mia intenco, kuŝi senmove kaj senpense sur mia dorso, estis serioza, sed subite kaj post nelonga tempo komencis min turmenteti unu penso — penso je miaj manĝaĵoj, troviĝantaj en miaj poŝoj. Mi longe ne rezistis, ekvidis kaj komencis elĉerpi ĉiujn miajn provizojn. Peco da pano, pomoj, du piroj — ho, kio estas tio? Kiu donis al mi ĉi tiun paketon en la poŝon?

Mi scivole komencis demeti kovrantan paperon kaj sub kelkaj paperaj tavoloj aperis al mi alloga paketo da konata svisa ĉokolado. Mi tuj ekkomprenis la situacion. Ĝi estis de mia

Difinu leĝon, ke ĉiu regnanto devas dum fiksita limtempo ellerni Esperanton kaj ebligu al administraj organoj, ŝtataj oficistoj, juĝistoj kaj al la gvidanta kaj reganta klaso scii la lingvon antaŭe.

Fari vesperajn aŭ dimanĉajn kursojn por vasta publiko estas afero tre facila, ĉar ne estas manko da kapablaj instruistoj. Esperanto fariĝu anima posedaĵo de ĉiuj popolklasoj.

La naciekonomia evoluo de nia ŝtato ne estos poste malhelpata de naciecaj bataloj kaj per eterna malkompreno, kaj tiel oni forigos la diferencojn inter la registaro kaj la naciojn.

Kiom da trankvilo kaj da valora tempo akiros la aŭstria registaro, kiu tiel evitos eternan traktadon pri nacieca kompromiso de siaj regatoj!

Kiom da tempo — preso — kaj laborŝparo signifos tiu ĉi akiraĵo, ni eĉ ne povas al ni imagi.

Ni prezentu al ni la facilecon, kiam oni povas en publikaj proklamoj, hejme eĉ en fremdlando, dum diplomataj aŭ privataj traktadoj inter la membroj de malsamaj nacioj, dum restado en fremdlando kaj vojaĝo tra la mondo, dum tutmondaj kongresoj k. t. p. paroli unusolan, de ĉiuj partoprenantoj komprenatan lingvon. Kiel

filino, kiu konante mian frandeman langon, ĝin kaŝe enŝovis en mian poŝon. Mi ĝoje ĝin akceptis, sed dume min pli allogis la du molaj, sukoplenaj piroj.

Post kelkaj momentoj falis ree mia rigardo sur la ĉokoladon, respektive ĝian kovrilon. Ho, bone konata fabrikaĵo de Tobler. Mi rememorigis, kvankam mi ĝin ne sciis tute certe, ke la fabriko vigle subtenadis nian esperantistan movadon. Tute certe mi ion pri ĉi tio legis aŭ aŭdis, eble dum mia kongresado en Svisujo — kaj ĉe tio mi preskaŭ senkonscie kaj senvole malfermis la paketon.

Subite elfalis el ĝi malgranda kromotipa bildeto.

Ho, kio? Se mi ne estus ĵus kuŝinta sur la tero, mi certe estus falinta. Sur la bildeto mi ekvidis kadukan maljunulon, akompanatan de skeletulo, kaj malsupre sub liaj piedoj etendis sin sovaĝa, romantika pejzaĝo, kaj en la malantaŭo leviganta ĵus suno per siaj radioj flavruĝe koloris iajn montojn. Mi ne komprenis kion la bildo signifis, sed sur la marĝeno mi legis: Lingvo internacia Ido. Lernez Ido!

De ĉi tiu momento mia ripozo estis for. Je nenio mi volis pensi, pri nenio mi volis min okupi, kaj jen, nia afero min persekutas ankaŭ en ĉi tiun solecan lokon. Ĉu estis eble, ke la fabriko samtempe subtenis ambaŭ internaciajn

Esperanto a zařid'ŝte, by orgánové správni, státní úředníci, soudcové, vedoucí a vládnoucí třída předem si řeč osvojila.

Zavést večerní či nedělní kurzy pro širší obecnostvo jest věcí snadnou, neboť schopných učitelů není nedostatek. Nechť Esperanto stane se duševním majetkem všech lidových vrstev.

Nebude dále zdržován národohospodářský vývoj našeho státu národnostními boji a věčným nedozorozuměním, a tak odstraněny budou rozpory mezi vládou a národy.

Co klidu a drahého času získá rakouská vláda, která tím bude ušetřena věčných, nikam nevedoucích vyjednávání, aby své poddané přivedla k národnostnímu vyrovnání.

Jakou úsporu času, tisku a práce bude znamenati tato vymoženost nemůžeme si ani představit.

Představme si ono pohodlí, kdyby při veřejných proklamacích, ať doma či v cizině, při jednáních diplomatických či privátních mezi příslušníky různých národů, při pobytu v cizině a cestách světem, při světových sjezdech atd. mohlo být jednáno jen v jedné, všem účastníkům srozumitelné

lingvojn? Tio estus vere klasika neŭtraleco — vere simila al nuntempaj neŭtraluloj. Estis ankaŭ eble ke miaj rememoroj min trompis, sed ĝi estu tiel aŭ alie, mi perdis mian kvieton kaj decidiĝis iri returnen en la vilaĝon.

Ĝi estis efektive nepre necese, ĉar kien — ajn falis mia rigardo, mi vidis ĉie ian skeleton — morton, kadukan maljunulon kaj antaŭ ĉio la malfeliĉajn vortojn: Lernez Ido, lingvo internacia!

Alveninte en la vilaĝon, mi efektive iom forĝesis ĉi tiun okazintaĵon. Ĝi estis en la tempo de rikolto, kaj en unu garbejo, kiun mi preterpasis, draŝis monotone du belaj vilaĝaj virinoj pajlon por garboligiloj.

»Bonan tagon,« mi salutis, iom haltante. La virinoj apenaŭ respondis, sed ilia rideto malkaŝis al mi, ke mi ne ĝenas.

»Ĉu mi povas al vi helpi? komencis mi ree.

»Ĉi tion vi ne povos,« respondis al mi unu el belulinoj.

»Kion vi opinias?«, rediris mi: »mi sciis draŝi jam en la tempo, kiam vi ambaŭ ankoraŭ ne estis en la mondo, kaj ne po du, sed po kvar, eĉ po ses.«

»Ne eble, respondis ree unu el la virinetoj. »Certe,« asertis mi, »se vi nur lavas trian draŝilon mi tion tuj al vi montros.«

la senpera kompreniĝo entuziasmigus kaj fratigus la ĉeestantojn!

Kian epokan signifon havus Esperanto por la komerco, por monda komerco, estas vere ne imagebla. Tiam malaperus malhelpo de limoj kaj de malproksimo, kaj por ni estus egale veturi aŭ skribi tien, kie komercas Japano aŭ Ĥino, Hispano aŭ Franco, Portugalio aŭ Greko, Turko aŭ Arabo. Tiam certe nia komerca talento kaj lerteco ne havus limojn.

En la nuna granda epoko de surprizigaj renversoj, kiam la vortojn Homara Libereco akompanas grandaj devizoj, kiam pro naciaj diferencoj rivero fluas la homa sango, ni atendas la tempon, en kiu la nacioj denove fratigos. Kaj kune kun tiu granda epoko komencos eĉ grandaj ŝanĝoj, kaj jen estos Esperanto por dispono al la homaro, por uzi ĝin al reciproka konkordiĝo kaj por eterna paco.

Ni sentas, ke Esperanto ne malutilos al nia gepatra lingvo, kontraŭe, ke tiu ĉi estos en la mondo ŝatata kio ĝi vere meritas, kaj samtempe ĝi estos egalrajta en la vico de aliaj nacioj. Ni amas ĝin tiom pli, ni fierigos per ĝi kvazaŭ per altpreza ŝtono, ĉar tiam oni scios pli multon eĉ pri ni kaj estos eble senpere kun ni rilati. Pri nia gepatra lingvo ni ne bezonos plue timi kaj por ĝi batali. Nia patriotismo similos la

reĉi. Jak by to bezprostřední dorozumění nadchlo a sbratřilo přítomné!

Jaký epochální význam mělo by Esperanto pro obchod, pro obchod světový jest přímo nedomyšlitelným. Zmizela by překážka hranic a vzdálenosti a bylo by nám lhostejným psátí či jeti tam, kde obchoduje Japonec neb Číňan, Španěl nebo Francouz, Portugalec či Řek, Turek nebo Arab. Pak ovšem náš obchodní talent a důmysl by neměly mezí.

V dnešní veliké době překvapujících převratů, kdy slova Svoboda Lidstva provázena jsou velikými hesly, kdy z národních rozdílných krev lidská potokem teče, očekáváme dobu, kdy národové se opět sbratří. A s tou velkou dobou i velké změny nastanou a tu bude Esperanto na místě, aby je lidstvo ku vzájemné dohodě a věčnému míru upotřebilo.

Cítíme, že náš mateřský jazyk Esperantem neutrpí, naopak, že nabude ve světě té vážnosti, která mu jistě náleží a při tom bude roznohým v řadě jiných národů. My jej budeme tím více milovati, budeme se jím chlubit jako drahokamem, protože pak o nás bude se více věděti a bude možno s námi se přímo stýkati. O svoji mateřštinu nebudeme se muset dále báti a pro ni bojovati. Naše vlastenectví bude podobno

Ridante alportis al mi unu el la draŝintoj pezantajn draŝilojn, apartenantajn al ŝia edzo, nun soldato ie en fremdlando, kaj post kelkaj momentoj eksonis el la garbejo la vigla ritma draŝado. unu. du. tria. unu. du. tria.

Draŝante mi samtempe observis ambaŭ miajn kunulinojn. Ilia vesto konsistis el mallonga, simpla ĵupo kaj el ĉemizo kiu delikate montris iliajn virinajn formojn. Mi rememorigis, ke, kiam mi estis ankoraŭ junuleto, mi tute simile kaj ĉe simila okazo kun simila plezura observadis ia tiamajn junajn virinojn, kiuj hodiaŭ, post tiom da jaroj estas certe jam maljunulinoj. Sed kial maljunulinoj? Ĉu miaj sentoj, kaj miaj rigardoj estas ankaŭ atestantoj de mia maljuneco?

Unu, du, tria, unu, du, tria.

Subite antaŭ miaj okuloj aperis ree la bildo kun kaduka maljunulo, kaj lin akompanata skeletulo — lernezo Ido! Ho, vi perfidaj idistoj! Se anstataŭ la pajlo kuŝus nun unu el vi sur la planko. Nur forte, nur pli forte, belaj virinetoj! Ĉu vi lin ne vidas? Jen, la perfidulo! Batu nur, batu, unu, du, tria, unu, du, tria — kaj kiel furiozulo mi batis sur la korpon de l' idisto, el kies vundoj jam rivero fluis ruĝa, ŝaŭmanta sango. Sed ĉi tiu aspekto min ankoraŭ pli incitis. Unu, du, tria. La planko estis jam plena de ruĝaj makuloj, sed sur la

planko ne kuŝis jam nur unu malfeliĉa idisto, sed multaj, pli multaj, kaj mi ilin draŝis, unu, du, tria, ĝis pecoj el ili ĉirkaŭ flugadis. Sed, ho ve! Ili estis jam tro multaj, tuta regiono estis plena de ili, kaj ilia fronto etendiĝis de Norda maro ĝis al alpa montaro. Milionoj da ili jam estis — almenaŭ iliaj gazetoj ĉi tion asertis, sed niaj esperantistaj armeoj kalkulis jam pli ol kvin milionoj. Sed estu la nombro tia aŭ alia, la mondmilito, kiu eksplodis inter idistoj kaj Esperantistoj, estis la plej terura, kiu okazis dum la homa historio.

Estante unu el generaloj mi staris sur malalta deklivo kaj kun streĉitaj okuloj rigardis la teruran batakampon. Ĉiu loko estis jam plena de vunditoj, kadavroj, kaj mortantaj homoj, kaj la batalo ĉiam, kaj denove furiozis. Unu, du, tria... Kamaradoj! vokis mi senĉese, antaŭen nur, antaŭen! Ne timu la morton! Vidu, ĝi staras ĉe mia flanko, ĝi akompanas min, maljunulon, kaj ĝi min tute ne timigas. Eterne vivi neniu povas, sekve estas indiferente kiam, aŭ kie ni mortos! Sed la vivo ne estas ebla kun ĉi tiuj perfiduloj!

Kamaradoj, pripensu kio nur okazus, se ni malvenkus en ĉi tiu terura kaj decida horo! La milito eksplodis certe post kelkaj jaroj, ĉar daŭra paco ne estas ebla, se unuj uzas akuzation, kaj la aliaj ĝin ne akceptas. Tio ĉi ne

trankvilan patriotismon de Anglo, kiu ankaŭ neniam bezonas timi pri sia lingvo. Kiel ideala epoko komencos, post kiam efektiviĝos la ĉi tie priskribitaj supozoj! Al la nacieca malamo oni prenos ekziston kaj la multnombraj nacioj de Eŭropo vivos en konkordo kaj toleremo unu apud la alia.

Do, rekongiĝu Aŭstrio el centjaraj doloroj eĉ naciecaj kvereloj kaj konfliktoj!

Sur la sojlo de la nova epoko vekigu por la nova al la progreso konforma vivo! Suprenlevu la piedpremitan standardon de anima libereco de viaj nacioj kaj tenu ĝin super viaj infanoj!

Socha-Uher.

klidnemu vlastenectví Angličana, který se též nikdy o svou mateřštinu báti nemusí. Jak ideální časy mastanou, až skuteční se zde uvedené předpoklady! Národnostní záští se odejme půda a ti četní národové Evropy žítí budou ve svornosti a snášlivosti vedle sebe.

I vzpamatuj se též Rakousko ze staletých bolestí a národních svárů a sporů!

Na prahu nové doby prohlédni k novému, pokroku přiměřenému životu! Pozvedni pošlapaný prapor duševní svobody svých národů a drž jej nad dětmi svými!

Socha-Uher.

Dro Stanislav Kamaryt:

NACIISMO EN INTERNACIISMO.

La kulturo de la 19a jarcento estis sub influo de universalaj ideoj. Daŭris tri jarcentojn ol ili estis klare difinitaj. La devizo de la franca Revolucio proklamis ilin tre laŭte! Libereco, egaleco, frateco! La devizo estas mallongigoj. Ankaŭ tiu ĉi. Ĝi signifis liberecon, egalecon, fratecon universalajn, tio estas por ĉiuj homoj de kiuj ajn gento, nacio aŭ klaso. Filozofoj de la klerula

jarcento rigardis evolucion de la estoj laŭ vidmaniero de la universaleco, homaraneo, kaj laŭ tiu pensmaniero konstruis siajn filozofiajn sistemojn. Naturaj rajtoj de la homo estis per ili kodifikitaj. Roŭseau pentras Emlon kiel simplan filon homan sanan kaj fortan sen influo de hereditaj kaj rasaj specialecoj. Voltaire paroligas en siaj komedioj skemojn, abstraktajn tipojn homajn, senigitajn de individuaj aĉoj. Franca nacia konvento dekretas sistemon metran, fonditan sur mezuroj de la Tero, de la Tero kiel korpuso ĉiela apartenanta al neniu kaj al ĉiu nacio.

estus paco, ĝi estus nur preparo al definitiva monda ruino. Kamaradoj, antaŭen, unu, du, tria, unu, du, tria!

Sajnas, ke la fortuno staras ĉe nia flanko; nun, aŭ neniam! La idistaj legionoj maldensigas, jes, certe ni venkos, ni devas venki! Se nur tiom ne pluvus. Nu, vi skeletulo, kovru min do per via tuko; mi estas jam malseka kiel oceano kaj mi tremas de malvarmo sur tuto mia korpo.

Estas efektiva granda frostoj. Bedaŭrinda batalantoj kaj milfoje bedaŭrinda la homa ruĝa sango, kiu ŝprucas, kaj rivero fluas pro akuzativo aŭ neakuzativo!

Sed estos foje certe ree pli, multe pli bone. Ĉu vi ne vidas, tie malantaŭe, malantaŭ la montoj la unuajn radiojn? Kiel kuriozoj de pli, belaj tagoj kaj tempoj ili kuŝigas sur detruitaj kampoj kaj la regiono ekbrilas kiel multkolora pentraĵo. Mi ankoraŭ unufoje aŭdis la teruran de izon: »Lernez Ido,« sed la krio ĉiam mallaŭtigis — — kaj mi malfermas la okulojn.

Mi kuŝas en ĝardeno apud unu garbejo, ĉe mi staras du belaj vilaĝaj virinetoj, unu frotas miajn fruntojn kaj vangojn per malsekaj tukoj, kaj la alia verŝas sur min unu kruĉon da malvarma akvo post alia, kaj ambaŭ zorge rigardas mian morte palan vizaĝon.

»Nu, vi min bele timigis,« diris unu el ili,

»kial vi provas laboron, ne estante sufiĉe forta?«

»Vi estas tute prava,« respondis mi, »sed ĝi estis eble alia kaŭzo,« kaj ĉe tio mi pripalpis ĉiujn miajn poŝojn.

Mi malrapide rememorigadis, kaj kiam en unu el la poŝoj mi trovis la ĉokoladon, tiam ĉio estis al mi jam klara.

Mi elprenis la paketon kaj honteme ĝin prezentis al ambaŭ belaj draŝistinoj. Ili ne volis ĝin akcepti, sed kiam mi asertis, ke mi nepre ne povas ĝin manĝi, ĉar ĝi estus mia morto, nur tiam ili ĝin, ĉiam hezitante, akceptis.

»Ĝi estas eminenta ĉokolado,« daŭrigis mi, »gustumu ĝin nur.«

Sed la virinetoj staris senmove kaj ne gustumis. Ho, mi stultulo, ili certe nun suspektas la ĉokoladon. Kaj vole nevole mi devis al ĉi tiuj simplaj vilaĝaninoj klarigi ĉion, kio inter ni Idistoj kaj Esperantistoj okazis, sed mi ekvidis, ke ili neniam pri ĉi tiuj du malamikaj gentoj aŭdis, kaj ke ili nian militon ne komprenis, tute same kiel ili ne komprenas la nunan teruran, mondmiliton, en kiu ankaŭ iliaj edzoj kaj fratoj partoprenas, eble eĉ mortas.

Fine mi ilin tamen konvinkis pri la sendanĝereco de la ĉokolado, kaj el iliaj ridetantaj okuloj mi ekkomprenis, ke ĝi estis efektive bona kaj ne venena.

La klerulaj pioniroj projektas kaj fondas enciklopediojn kiuj enhavus sciojn de ĉiuj nacioj kaj individuoj kaj servus por ĉiuj nacioj kaj individuoj. Universaleco, jen la ĉefa devizo de la klerula epoko. Ĝi volis forigi la barojn inter la nacioj kaj la sociaj klasoj, finkonduki la postulojn nacionalismajn kaj klasifiki en universalaj skemoj multecon de ekstera kaj interna mondo.

Daŭrigo de tiuj ĉi universalaj tendencoj estis entuziasmo, kun kiu estis kondukita la ekspedicioj de Napoleono por disvastigi la francan imperion trans Rheinon, kaj por fari Francon reganto de la mondo tuta.

Tiel baldaŭ bankrotis la universalaj ideoj de klerula jarcento. Revolucio kaŭzita per ili akceptis tuj karakteron nacionalan, kaj multaj el ĝiaj ĉefoj estis imperialistoj pli konsciaj ol Wilhelm II. Universalaj ideoj de la frateco de ĉiuj nacioj kaj de ĉiuj homoj estis unua kaj fundamenta spirita nutraĵo de Napoleonaj soldatoj, kiuj iris kun entuziasmo de romana koro militpreni la tutan Eŭropon ne por libereco, sed por Francujo, por sia Francujo.

Laŭ la leĝo de la ago kaj la reago sekvis la malvenkon de Napoleono la granda ondo de kreskanta nacionalismo de ĉiuj mez-eŭropaj nacioj. Precipe la germanaj nacioj evoluis tre nacionale. Angloj firmigis sian tutmondan ekonomian hegemonion Germanoj eksolvis problemojn pri diferencoj inter la praktika kaj la pura intelektoj kaj solvinte ilin, ili naskis Bismarkon kreintan per fero kaj sango la sanktan nacian imperion germanan per franca mono, kaj la granda nacionala imperio germana havis multajn sukcesojn. La Danoj disiĝis de Norcoj formante propran lingvan kulturon. La Nederlandanoj firmigis sian kolonian posedaĵon. La Bohemoj (Ĉeĥoj) post centjara dormado ekvivis. Ili instruis sin je reviviĝo germana, entuziasmiĝis per la romanismo kaj ekvivis per forta vivo politika, per kiu intencis krei propran kulturan vivon. Slovakoj disiĝis de Bohemoj por vivi memstare. Sed ankaŭ ĉe la aliaj eŭropaj nacioj evolucis la nacionala konscio tre potence. La nacia ideo plifortiĝadis dum la tuta deknaŭa jarcento. Eĉ nacioj jam preskaŭ forgesitaj ekstaris kaj ekrek-lamaciis sian rajton je propraj naciaj kulturoj. En fino de tiu jarcento en Anglujo la Kimroj, en Hispanujo la Katalunoj, en Francujo parto de Normandoj volas havi

propran nacian kulturon de la elementa lernejo ĝis universitato kaj de vendisteto de terpomoj ĝis kartelo de fabrikistoj. Ĉiu nova nacio volas esti mastro en sia hejmo spirita kaj materia, tute same kiel la grandaj nacioj. Tial ĝi suspekto rigardas ĉiujn aliajn naciojn, kaj malamike ĉiujn apudajn naciojn, ĉar ĉiuj nacioj estas ĝiaj konkurantoj kaj mirinda afero, nacionalisma sento estas sento kolektiva kaj tamen en dua duono de la glora jarcento tre laŭte proklamigis tendencoj individualismaj. Rajto de individuo estas devizo tiel potenca kiel iam la vorto »ŝibolet« kaj estas predikata de multaj kleraj, spritaj, laborantaj kaj diligentaj homoj en la tuta Eŭropo. Kvankam ĉiuj nacioj tre fervore laboregas por plibonigi kaj plifortigi sian staton por povi kontraŭstari la naciojn apudajn kaj jam pro tio malamikajn, tamen ekzistas tre multaj fidelaj filoj de ĉiuj nacioj, kiuj pensas, ke la plej efika rimedo por fortigi la propran nacion estas doni la plej grandan liberon al ĉiu individuo. Sed tiun ĉi tendencon rimarkinde ĉe ĉiuj nacioj kontraŭstaras tiuj, kiuj regas sorton de nacioj.

La ideo sistemo de la liberalismo, kiu regis la spiritojn dum la tuta 19a jarcento supozas kiel la individuon liberan, kaj aljuĝas al ĉiu individuo bonajn kapablojn. Sed la realaj bezonoj de la liberalisma ŝtato devigis ankaŭ la liberalajn teoriulojn kaj praktikulojn enkonduki limigojn de la individua libereco, limigojn tre gravajn. Sed kontraŭe tute ne mankis filizoj kiuj proklamis absolutan liberecon individuan kiel ĉefan kondiĉon de la sociala progreso. Max Stirner kaj liaj disciploj fondis rondon de sindonaj batalantoj.

Ŝajnis kelkafoje, ke tendencoj nacionalismaj eligas la tendencojn individualismajn. Tio estas pura ŝajno. Individuo postulas siajn »naturajn individuajn rajtojn« sole por esti honorata de la ceteraj homaj individuoj. Ju pli granda socio, des pli estas ĝiaj membroj pretendemaj. Tial deziroj de la individuo kolektiva, kaj de la individuo simpla, koincidas. Potencan deziras la nacio kaj la naciano.

Tiu deziro estas internacia, ĉar ĝi estas ĉe ĉiu nacio. Sed ne ĉiu nacio havas la egalajn poveblojn realigi sian volon al potenco.

La forton de nacionalismaj ideoj plej grave dokumentas la grandega eŭropa

milito, kiun multaj ŝtatanoj kondukis kun vera patriota entuziasmo.

Kaj tia estas tendenco de la evolucio kiu komencis jam antaŭ la militego. La nacioj dividiĝis, malgrandaj nacioj ekvivas kaj naskiĝas inter la grandaj. Sed ĉiuj ĉi malgrandaj kaj malfortaj individuoj volas havi la samajn rajtojn kiel la grandaj kaj oni jam komencas konsenti pri tio. Eĉ la grandaj nacioj trovas bona ne malgrandigi la rajtojn de la malgrandaj. Sed la malgrandaj povas uzi la rajtojn de la grandaj sole se ili estas organizitaj en grandaj tutaj. Tial fondiĝos grandaj organizacioj, en kiuj la malgrandaj ne malaperos, sed evoluos plej intensive. Tiela evolucio bezonos ankaŭ specialajn instrumentojn faciligantajn partoprenon de ĉiuj en la tutmonda celado. Tiuj instrumentoj ekzemple estas: paco, internaciaj rilatoj, internaciaj societoj, internacia lingvo, libera komerco.

Tiun tendencon de la evolucio mi nomas: internacia nacionalismo. Ĝar ĉiu nacio fariĝos per ĝi internacie potenca. Kaj la internacia kulturo kreskos kaj perfektiĝos per la kunlaboro de ĉiuj nacioj, ankaŭ de la malgrandaj.

K. Stan. Neumann:

LA TAGO.

Kiel lakto ĝus melkita
 aer' estas malvarmeta, densa, ŝaŭma.
 Mi bedaŭras muŝeton bluan,
 kiun hazarde mi dispremis.
 Birdon pafmortigi mi hodiaŭ ne povus,
 per ordon' severa interrompi kanton;
 kiel ŝtonblok' grandega ĝi de branĉo falus,
 kaj la ter sub ĝi barelsimile eksonus.
 Kie mi kaŝus min pro tim' kaj honto?
 La suno min ĉie eltrovus.
 Ĝi ne dirus vorton, ĝi nur min rigardus
 per sia printempa okulo. Kaj mi estus nuda.
 Per kantoj birdaj plensemita estas tago
 kiel se ĉiuj estas ia interna premo.
 kaj apud, super mi, dekstre kaj maldekstre
 graciajn manojn de radioj al si reciproke
 premus.
 Per kantoj birdaj plensemita estas tago.
 En ĝi estas ia interna premo.
 Al neniu mi volus kaŭzi ĉagrenon.
 Mi atentis ankaŭ por ke mia ombro
 ne falu sur ion kiel nubo.

Trad. Dro. Stan. Schulhof.

Originale de Běla Rajchlová:

LA ELSOPIRITA FELIĈO.

(Daŭrigo.)

Fine ŝi ricevis la fileton, sed ŝi estus preskaŭ paginta lian naskon per sia propra vivo. Sed la dolora turmento estis baldaŭ forgesita kaj ili ambaŭ ĝojis el la bela infano, kiu kreskis kaj fortiĝis. Ho, kiel ŝi en tiu tempo kun ĝojo levadis sian Karlon en kuseneto kaj kantante dancis kun li en la ĉambro — poste alvenis longa, dolora malsano, brulumo de artikoj, kaj post duono da jaro de terura turmentado ŝi enmetis sian karegan infanon en ĉerketon.

Denove ŝi estis graveda, denove ŝi havis fileton, bluokulan Slavon kaj eĉ tiu ĉi baldaŭ finis la mallongan vojon de sia vivo. Tiam ŝi estis kiel freneza, neniu povis ŝin konsoli. La konata maljuna kuracisto diris al ŝi, ke ŝi neniam havos sanajn infanojn, ĉar ŝia edzo estas grave malsana.

Ŝi do estas kondamnita resti sen infanoj, ŝi, kiu en la infano vidis la plenumon de siaj revoj. Sen celo ŝi devos paŝi tra la vivo kaj malaperi el la mondo, kiel seka arbo. Ŝi riproĉis al la sorto, kial ĝus ŝi, sana kaj por la patrino destinita, devis kuniĝi kun viro malsana, — sed semtempe ŝin tiu penso timigis kaj ŝi penis forpeli el la animo la maldolĉecon, kiu kreskis kontraŭ ŝia edzo, kun kiu ŝi pro amo geedziĝis, sed la vekita penso kreskis kaj en diversaj kombinaĵoj plenisgis ŝian animon kvazaŭ en sorĉoj. Havi sanan infanon, kiel kompenson por malsana edzo, por kiu ŝi povus vivi, tio estis ŝia sola ideo, kiu trapenetris ŝian tutan estaĵon.

Ŝi sidadis en la kuirejo ĉe la fenestro kaj rigardis ludantajn infanojn tiel incitante sian doloron. »Manjo, estu seĝa« — trankviligis ŝin la patrino, kiu post la morto de Slavo restis dum iu tempo ĉe Manjo — »vi devas pensi, ke ne ĉiam estas la plej bona tio, kion ni tiel arde deziras. Mi ankaŭ pensis, ke mi certe mortos, kiam mi, post kvarjara edzeco estis konstante seninfana. Tutajn vesperojn mi trapreĝadis, eĉ mal-esperi mi volis, kaj fine mi elpreĝis vin, — kaj hodiaŭ, se mi farus kalkulon el ĝojoj kaj ĉagrenoj kiujn via vivo al mi alportis, ĝi estus mirinda. Ho, kredu al mi, ke ĉiu via sufero brulas mian konsciencon kiel fajro, nun mi vidas, kiom da egoismo estas

en mia sopiro je infano. Mi volis havi infanon por mia ĝojo kaj mi ne pripensis, ke tiu infano ankaŭ suferos kaj eble eĉ malbenos la momenton, en kiu ĝi naskiĝis.

»Sed patrino« — Manjo tiam ekkriis nerveme — »se ĉiu homo havus similan opinion, kie estus la mondo? Mi kredas, ke la vivo alportas multe da ĝojo kaj la plej granda feliĉo troviĝas en tio, kiam ni donas al la mondo sanan infanon kaj edukas ĝin por honesta homo, je kiu oni povas esti fiera kaj mi neniam kredos, ke pli bona estas malgaja vivo sen infanoj kun malsana edzo — — —« jen ŝia voĉo eksilentis kaj ŝi ne finis la maldolĉajn vortojn, kiuj plenigis ŝian koron.

Post simila eksplodo la patrino ordinare eksilentis kaj Manjo denove enfalis en siajn revojn, havante tempon da ripozo de sia zorgema patrino.

Jardo nenion sciis pri ĉi tiuj bataloj; silentemon kaj malĝojon de sia edzino li al si klarigis kiel ankoraŭ malfermitan vundon post la foriro de amata infano kaj li gardis sin eksciti Manjon per kia ajn konsolo.

Li havis ankaŭ zorgojn pro sia malsano, kiu lin konstante turmentis. Li vizitadis por konsilo la kuracistojn en ĉirkaŭaĵo kaj li konsolis sin, ke li saniĝos. Ofte li promenadis sola, ĉar Manjo protestis, ke ŝi ne volas sin montradi kun sia doloro. Ŝi sidadis sola, meditante pri sia sorto kaj farante planojn en estontecon — planojn, kiuj ŝin timigis, jen denove incitis per sia kuraĝeco: Ĉu ŝi povus havi infanon de sana viro — — —!?

(Daŭrigota.)

JUNECO, PRINTEMPO, FABELO.

Juneco, printempo kaj fabelo! Kiel ĉarma, harmonia trio! Homa juneco, printempo sur la tero kaj fabelo de la amo, eble eĉ de la unua amo de du homaj flampolenaj koroj! Oni diras, ke la revemaj animoj kaj revemaj koroj vivas ĉiam en sonĝo, en dolĉa deliro kaj en fabelo.

Tion ni ne kredu! Estas nek fabelo, nek sonĝo sed efektiveco, se trovas sin du puraj, idealaj karakteroj, kiuj kuniĝinte per zono de sanktaj sentoj, iras kune tra la vivo, vivante unu por la alia. Kaj se iam brutala mano de la sorto disŝiras aranean teksaĵon de ilia feliĉo, anstataŭas la ĉarman fabelon de la vivo malĝoje melankolia elegio, por kies moderigo servas heroo memofero kaj la konvinko, ke la perditan propran feliĉon — aŭ almenaŭ ĝian

rebrilon — ni povas trovi en feliĉo de la aliaj, se ni senprofite kaj volonte por ĝi penadas.

KRONIKO.

Praha. »Fraŭlina rondeto« aranĝis la 22. jun. esp. vesperon, kiu celis veki intereson por nia literaturo. Post la parolado de fino. Ŝupichova pri esperanta literaturo, sekvis recitaĵoj el niaj originalaj eĉ tradukitaj verkoj, muzikaĵoj kaj kantoj. Post la elĉerpo de la programo oni traktis pri la tradukado de niaj naciaj kantoj en Esperanton. La diskuton vigle partoprenis la gastoj soj. prof. dr. Kamaryt, fin. sek. Schmidt, prof. Stejskal kaj Hromada.

Plzeň. La entombigo de la mortinta prezidanto de Esper. klubo so. supera imp. admin. Novohradský okazis la 30. de junio en Praha. La funebran ceremonion partoprenis multaj esperantistoj el Plzeň kaj Praha kaj delegitoj de ŝtata oficistaro el Plzeň. Super la tombo de la mortinta propagandisto parolis boheme kaj esperante en la nomo de Esper. klub en Plzeň kaj de la eldonantaro de La Progreso so. Tittl.

Karlovy Vary-Karlsbad. Danke al la fervora agado de S-ro G. Virenius el Petrograd, kiu kaŭze de milito estas devigita restadi en Karlsbad, oni komencis ankaŭ en nia urbo pli vive okupi sin per Esperanto, kiu en nia mondifama kuracurbo povus havi grandaŭ signifon kaj utilecon. La 15an de aŭgusto okazis la unua kunveno esperantista, kiun ĉeestis inter aliaj S-ro D-ro Aleksandro Giesswein, prelato kaj hungara parlamentano okaze estanta en Karlsbad por kuraco. Lokaj gazetoj raportis pri la kunveno; unu el ili ankaŭ enhavis longan propagandan artikolon. Oni decidis de nun pli ofte kunveni, aranĝi esp. kurson kaj fondi grupon.

Řepčín ap. Olomouc. Ĉi tie aranĝis kurson por 10 monaĥinoj so. ing. Berger, kiu finis la 1. aŭg.

En Novcsady ap. Olomouc aranĝis nia meritplena amiko so. Kudela la 25. julion okaze de popola festo esperantan ekspozicion, kiu vekis rimarkindan intereson. Klarigan priparolon dum tiu ĉi ekspozicio prezentis so. ing. Berger.

La instituto Bohema Esperanto-servo translokiĝis el Hodolany ap. Olomouc la 15. aŭg. en Moravany ap. Pardubice (Bohemujo).

En multaj lokoj nia movado dum someraj monatoj ripozis.

UNIVERSALA KORONOBLECO.

Internacia Ligo de progresemaj homoj.

La plej eminenta el ĉiuj virtoj estas kaj restos ĉiame ĉe homo la amo, ne sole al tuta sia popolo, sed al la tuta homaro. Tiun ĉi virton oni nomas »Koronobleco«. En la mondo, eĉ en la superaj klasoj, kiuj gvidas la popolojn, estas absoluta majorito de l' homoj, kiuj ne posedas la Koronoblecon. Pro tio estas en la mondo tiome da larmoj, pro tio unu fondas sian bonfarten sur la ruino de la alia. Internacia Ligo de progresemaj homoj celas igi la

Koronobleco universalas; pro tio ĝi portas la nomon »Universala Koronobleco«. Ĝiaj principoj estas: 1. Forigo de la subpremo de rasoj, nacioj, laboristoj kaj virinoj. 2. Forigo de la diĥoĥo, prostitucio kaj pornografio. Pro tio ĝi influas al la agado de siaj membroj, aranĝas kunvenojn, eldonas Esperanto-presaĵojn edukantajn al la Koronobleco kaj batalantajn kontraŭ agadoj malaj al ĝiaj principoj. Povas esti membro ĉiu persono paginta 1/2 Sm. de jarkotizo. Membroj povas uzadi praktikajn servojn kaj ricevas adresaron internacian. Organo de U. K. estas »La Progreso«. U. K. starigas en ĉiuj urboj Delegitojn: Interesiĝantoj turnu sin al ĝenerala direktoro de Centra Ofico de U. K. Pastro Jaro Źelezný, en Plánice, Bohemujo.

* DIVERSAĴOJ. *

Ne aprobita! La eldonantaro de La Progreso traktis la 6. de aŭg. pri la postulo de niaj samideanoj en Praha enkonduki en nian gazeton pli multe da bohema teksto. La eldonantaro konsiderinte, ke al la redakcia demando enpresita en la 5.—6. no. de tiu ĉi gazeto kaj adresita al la abonantoj, estis ricevitaj nur protestaj respondoj kaj juĝante, ke tiu ĉi ŝanĝo malutilus al la ĝisnuna bona prospero de La Progreso, kiu estas en granda nombro abonata de nebohemiaj esperantistoj, decidis ne fari ŝanĝojn en la lingva teksto. Farante ĉi tiun principan decidon la eldonantaro konsideris, ke la enhavo de la nuna ŝpaĝa gazeto estus per tiu ĉi ŝanĝo rimarkinde malriĝigita, dum la redakcio klopodas por ĝia konstanta pliriĝigo. La eldonantaro volonte plenumas la alian deziron de niaj Prahanoj kompletigi la redakcian rondon, kaj tial ĝi petis la Konstantan Komitaton de B. E. proponi por tiu celo du sinjorojn el Asocio kaj du el Unio. Krom ĉi tiuj sinjoroj oni akceptos ankoraŭ alian redaktoron, loĝantan nek en Praha, nek en Plzeň. Por eviti malkomprenigon inter la membroj de tiel vasta redakcia rondo, oni difinis specialan regularon.

Al la nova laboro! Proksimiĝas aŭtuno kaj vintro, la tempo plej konvena por nia propagando kaj tial ni komencu plej viglan laboron por Esperanto. Ni sendadu mallongajn raportojn pri nia movado al niaj nacilingvaj ĵurnaloj, ĉar ili plej utile subtenas nian klopodon, ni aranĝu paroladojn pri la lingvo internacia kaj kursojn de Esperanto. En multaj lokoj troviĝas gravaj societoj fakaj kaj klerigaj, kiuj ĝis nun estas sufiĉe fortaj. Al ĉi tiuj proponu aranĝi paroladon pri la internacia lingvo por iliaj membroj kaj samtempe rekomendu al ili paroladon (se eble senpagan!). En ĉiu via klopodo ni al vi volonte helpos per konsilo, eĉ per ago. Laboru, klopodu vastigi Esperanton, ĉar ripozi en la nuna tempo estas vera peko!

El Hungarujo venas tre ĝojigaj sciigoj pri nia movado: Aperis nova gazeto de tieaj samideanoj »Hungara Esperantisto«, kiu certe sukcesos baldaŭ koncentrigi la frakasitajn fortojn de ilia movado. — En Budapeŝto estis de la 16. ĝis 22. aŭg. aranĝita »Orienta ĉeffoiro« (ekspo-

zicio de komercaĵoj), kiu enhavis esperantan sekcion. La fremdlandaj komercistoj ricevis senpage esperantan gvidlibron tra Budapeŝto. — La Fremdula Kancelario en la sama urbo uzas Esperanton, donante en ĝi ĉiujn deziratajn informojn pri loĝado, vojaĝado k. t. p. (Adr.: Budapeŝto VI, Harisbazar 1). — So. Balkanyi senlace aranĝas en Budp. paroladojn pri Esp. Ankaŭ la gazetoj alportas oftajn raportojn pri nia movado. — La Hungara landa societo esp. aranĝis sur la teraso de Milita ekspozicie fest-vesperon, per kiu ĝi honorigis la revenon de sia vicprezidanto so. Dr. Lóránd kaj membro so. Dr. Schat el la kaptiteco.

En Polujo ankaŭ ekregis vigla movado, precipe en Lódz, kie la senlacaj propagandistoj soj. Oskar Bermann kaj H. Zimmermann senlace kaj insiste laboras. So. Zimmermann redaktas tre bonan kaj vastan Esp. rubrikon en Neue Lodzer Zeitung, kiu alportas interesajn sciigojn pri nia movado. So. Bermann interalie aranĝas propagandajn ekskursojn de Lódzaj esp. en la ĉirkaŭajn urbojn. — Esp. soc. de Lódz aranĝis la 18. aŭg. esper. feston en Ruda Pabianicka en Stefanski Park, kiu estis pro sia brila aranĝo (ekspozicio, koncerto, paroladoj, poŝto, loterio k. t. p.) bonega propagando por nia movado. Por tiu ĉi festo estis eldonita pole kaj germane redaktita unutaga gazeto »Naprzód-Vorwärts«, kun propagandaj artikoloj.

Ĉeffoiro de Breslaŭ, kiu okazas de la 22. aŭg. ĝis 5. sept. en »Jahrhunderthalle« uzas Esperanton. La gvidantoj aranĝis en la foirejo Esp. informojn, kie oni oficas dum tuta tago kaj eldonis ilustritan gvidlibron tra Breslaŭ. Ĉiujn informojn pri la ĉeffoiro volonte ankaŭ donas la Ligo de Breslaŭaj Esperanto-unuiĝoj.

Atentigo. Ĉar nia gazeto enhavas de nun nur 8 paĝojn, ni povas enpresi fakajn kaj sciencajn artikolojn nur en amplekso de unu paĝo! Niaj fakaj kunhelpantoj skribu viajn artikolojn laŭ ĉi tiu amplekso!

Li vivas! Ni ricevis ĝojan sciigon el Vieno: El rusa kaptiteco revenis so. ĉefleŭtenanto Rud. Koutnik, prezid. de la Bohema klubo esp. en Vieno, pri kiu oni kredis, ke li falis sur batal-kampo. De la 25. aŭg. li estas en Hradec Králové.

El nia rondo. Nia hungara amiko so. Voloszynovich Dezső el Eperjes edziĝis la 12. aŭg. kun fino. Mihalich Ellus. Sinceran deziron de feliĉo en la nova vivo!

Eĉemaj grenatoj estas la nomo de la nova kolekto de esper. poemoj de nia poeto Dro St. Schulhof, kiun en luksa eldono post ne longe aperigos la eldonantaro de La Progreso.

Al Esperantista Voĉo! Por senutila polemiko ni ne havas emon eĉ ne lokon, tial lasu nin en trankvilo!

DOMON

kun granda fruktoĝardeno, en pli grava foir-loko de fruktodona kaj arbarriĉa regiono en Bohemio, Moravio, Supra aŭ Malsupra Aŭstrio oni aĉetos. Ekzisteblo por kudrolernejo kaj klavirinstruo estas necesa. Proponojn oni afable sendu al la administrejo de la Progreso.

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

(inĝ. L. Berger.)

translokiĝis el Olomouc-Hodolany, Moravio al Moravany apud Pardubice, Bohemujo.

Ĝi peras korespondadon, informas pri esp. movado, pri bohema nacio, prizorgas kaj korektas tradukojn, aranĝas paroladojn, kursojn, instruas persone eĉ skribe, vendas esperantajn librojn, glumarkojn, signojn, Mateon.

MATEO,

alie nomata paragvaja teo estas la sola efektive valora anstataŭaĵo por kafeo kaj hina teo. Ĝi enhavas 1% da kafeino, efikas refreŝige eĉ kurace. Pura naturaĵo antaŭ la milito rekte importata el Ameriko pere de Esperanto.

Tre taŭga por ĉiutaga trinkado.

Paketojn po 3.— K poŝte ĉien ekspedas kaj pli detalajn klarigojn donas

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

(inĝ. L. Berger)

Moravany-Bohemujo.

ESPERANTAN LITERATURON

de diversaj bohemiaj eldonistoj vi ricevos ĉe subskribita firmo:

Lernolibroj:

Ŭpln uĉebnice esperanta. Napsal Th. Ĉejka, 4. dopl. vydn K 1.50.

Ŭpln methodiek uĉebnice esperanta pro ŝkoly a samouky. Methoda Kuhnlova. Vz. K 4.20.

Esperanto. Mal uĉebnice a cviĉebnice. Napsala Julie Ŝupichov. K 1.—.

Esperanto snadno a dukladn za 20 hodin. Pro mldeŝ, samouky a kursy. Zpracovno zkušebn komis esper. spolku. S. A. Komensk v Chrudim. 2. vyd. K 1.20.

Mezinrodn reĉ esperanto pro samouky. Sepsal Fr. Vymazal. 3. vyd. **Slovnky esperantsko-ĉesk a ĉesko-esperantsk.** Sestavil Theodor Ĉejka. K 1.80.

Esperanto. Ŭpln, soustavn nauka s mluvnic a slovnkem. Napsal dr. S. Kamart. (V tisku.)

Fundamento de esperanto de Zamenhof-Kuhn. K 1.10.

Rozmluvy esperantsko-ĉesk s ũvodem a mluvnic. Napsal L. Piln. K —.26.

Vortaroj:

Slovnk ĉesko-esperantsk (25.000 slov). Sest. E. Kuhn a K. Prochzka. Vzan. K 6.—.

Slovnk esperantsko-ĉesk. Sestavil Th. Ĉejka. 2. vyd. K —.20.

Aliaj vortaroj kaj lernolibroj de Ĉejka estas disvenditaj.

Gazejoj:

Bohema esperantisto. Ĉesk esperantista. Msiĉnk pro ŝirn esperanta mezi Ĉechy. Red. dr. St. Kamart. R. III. (1908-1909) po K 3.—.

Ĉasopis ĉeskch esperantist. Red. Ed. Kuhn. Ĉio kun 20% plikarigo.

Ni havas ankaŭ malgrandan sortimenton de firmo Ader & Borel kaj prizorgos el aliaj literaturoj ĉion, kio estas en la nuna tempo ricevebla.

Ĉesk lidov knihkupectv a antikvarit (Josef Springer) v Praze,
Jlsk ulice 24.

Propagandaj broŝuroj:

Bouŝka K. H.: **Slovakoj kaj Magiaroj.** Kelkaj vortoj pri Slovaka suferado en Hungario. K —.60.

Krumpholtz: **Jazyk vŝeslovansk a esperanto.** Pr. 09. K —.20.

Couturat: **Ŭvahy o jazyku mezinrodnm.** Pr. 09. K —.80.

Fridrich: **Esperantismus a jeho svtov organizace.** K —.20.

Versaĵoj:

Schulhof dr. St.: **Atunaj floroj.** Dek originalaj poemoj. K —.60.

Schulhof.: **Kion la vivo alportis?** Dek originalaj poemoj. K —.60.

Schulhof: **Per espero al despero.** Dek poemoj. K —.60.

Rakontoj:

Jakub Arbes: **Rakontoj.** El ĉeŝa lingvo de Jos. Grna K 1.—, bindita K 2.—.

Machar J. S.: **Benedek.** Historia portreto. K —.60.

Ĉeŝov A.: **Du rakontoj.** Tradukis B. Kotzin. K —.40.

Ĉirikov E.: En malliberujo. Tradukis D.-ro Kabe. K —.40.

Tolstoj L. L.: **Kaŝkaza kaptito.** Tradukis F.-ino N. Sarapova. K —.40.

Kantoj:

I. **Esperu.** - II. **Mi amas Vin.** Du kantoj de Dro. Rolfo Dezo. K 1.20.